

& Al vi, lingvo mia:

< Rekante 41 el 82 batoj por strofo, entute 410 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (1911) kun moto "Vi, mia tuta vivo kaj trezoro! (El "Hamleto".)". Baladigis Martin Strid (2016) per kvazaŭ nova melodio kaj rekantaĵo nova.>

(#Melodio:

(/SoSo dodo mimi redo Tido re So; SoTi remi fare soso fare mi do; mido LaLa Lado fafa sofa mi do; Tido rere rere mire Ti So; SoSo dodo mimi redo Tido re So; SoTi remi fare soso miSo re do;

(#Rekantaĵe: So do mi reldo Tido re So; SolTi relmi fa relso fare mi do; mido LaLa Lado fafa sofa mi do; Tido rere rere mire Ti So; So do mi reldo Tido re So; SolTi relmi fa relso fare mi do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Al Vi, lingvo mia, mia Esperanto, ;
kiu en la tagoj plenaj jam je prozo ;
ravis koron mian, kaj per sun' kaj rozo ;
ĝin plenigis ĝis al superfluo, ; al Vi,
lingvo mia, mia Esperanto, ; sonu ree
mia hodiaŭa kanto.

(×: Paŝ, paŝ, paŝu2 en la ĉeno ;
**i2nte2r ĉarmo2 kaj ĉagreno ; Per
piedoj tondru takton sur la planko ;
Al poeto ni dediĉu dankon ; Paŝ, paŝ,
paŝu2 en la ĉeno ; i2nte2r ĉarmo2 kaj
ĉagreno.)**

'2 En malhelaj tagoj, preskaŭ en
aŭtuno, ; de la vivo mia la plej bela
peco, ; mia longe forgesita infaneco ;
sin enŝtelis kun Vi en la koron ; kaj
ankoraŭ unufoje en aŭtuno ; ekridetis je
mi ree varma suno.

'3 Ĉarmaj virinetoj de l' profunda maro,
; Karol Moor kaj Hamlet, stranga
princo dana, ; granda Guliver' kun
gento filigrana, ; cikonio kun infan' en
beko; preskaŭ ĉiujn mirojn de la ter' kaj
maro ; mi ekvidas per Vi, belajn en
komparo.

'4 De la vivo mia forgesita paĝo ;
malfermiĝas per Vi, lingvo mia kara, ;
kaj en vivo mia nuna, ordinara, ; Vi
permesis al mi, lingvo mia, ; legi ree
ion sur malnova paĝo ; pri pli belaj
jaroj, mia juna aĝo.

'5 Se mi estas iam al Vi malpli varma, ;
pro la efemera bildo de l' juneco, ; pro
malgranda de l' feliĉo peco, ; kiu per Vi
al mi ekaperis, ; ĉiam por Vi batos mia
koro varma, ; por Vi, lingvo mia,
lingvo mia ĉarma.)